EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:28; julio 19.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: 0 KB. Sume 300 KB

## Homaj rajtoj kaj indiĝenaj popoloj

Jen informoj pri la Internacia Stipendio-Programo de la Konsilio de Homaj Rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj (UN). La celpubliko estas membroj de indiĝenaj popoloj.

Temas pri lertigado pri la situacio de indiĝenaj popoloj, konatiĝo kun la Deklaro pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, malkovro de la strukturo de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu lertigado okazas tra plena jaro en la franca, rusa, angla, hispana kaj portugala. La limdato por aliĝi por la venonta jaro estas la 31-a de aŭgusto 2024.

https://www.ohchr.org/en/documents/brochures-and-leaflets/leaflet-indigenous-fellowship-programme

Pli da informoj eblos atingi en Aruŝa, en UN-kunsido vendrede je la 14-a horo.

Mireille Grosjean, reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo
Mirejo.mireille@gmail.com


## Grava scienc-teknika kunveno en Slovakio

La Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko okazos ĉeeste ĉi-jare! Ĝin bonvenigos Žilina, bela urbo en la nordo de Slovakio, kiu gastigis la unuan KAEST en 1978. La evento okazos ekde la 7-a ĝis la 10-a de novembro 2024.

Jam eblas aliĝi! Ĉiujn informojn kaj la aliĝilon vi trovos en la retejo **kaest.ikso.net**.

Vin atendas fakaj prelegoj, paneldiskutoj, trejnadoj, eblo kunsidi por fakaj sekcioj kaj grupoj, vespera programo, vingustumado kaj ekskurso al la kastelo Budatín.

La ĉeftemo de KAEST 2024 estas: **Esperanto kaj lingvolernado en la epoko de artefarita intelekto kaj virtuala realo**. Por proponi programeron (ĉu ĉefteman, ĉu aliteman), bonvolu plenigi ĉi tiun formularon.



Eksciu pli pri la loko, programo, kotizoj kaj aliĝu al KAEST 2024! Danke al la partnereco kun UEA, individuaj membroj de Universala Esperanto-Asocio ricevas rabaton de € 20, do ne forgesu indiki vian UEA-kodon en la aliĝilo.

La E@I-teamo invitas vin – ĉu aliĝi kaj prelegi aŭ simple aliĝi kaj ĉeesti en KAEST 2024. Por ke la faka vivo en

Esperanto evoluu! Se vi havas ajnajn demandojn, ne hezitu kontakti nin ĉe kaest@ikso.net. Ĝis la revido en Žilina!

La KAEST-teamo

***SMG***: Žilina estas grava fervoja nodo, alirebla facile el multaj direktoj. Eblas krome bicikle atingi la urbon. BEMI kaj IFEF apogu min! Des pli, ke Žilina ne havas internacian flughavenon nek estas oceana havenurbo

## La paralela universo

***Paralela Universo*** estas unu-taga festo de Esperanto, okazonta en diversaj lokoj tra la mondo: https://paralelauniverso.com/. Ĉi-jare *Paralela Universo* (PU) okazos la 17-an de aŭgusto, kaj estos pli vaste festita ol iam antaŭe: por helpi, plusendu ĉi tiun invit-mesaĝon al Eo-organizantoj aŭ aktivuloj, kiujn vi konas. Eventoj estas interpersonaj (*ne* virtualaj) kaj kutime inkluzivos grupajn agadojn kaj manĝon, daŭrante kelkajn horojn. La celo estas doni al ĉiu esperantisto eblon partopreni sen vojaĝi tro for. Oni povos renkonti novajn kaj malnovajn amikojn, kaj fari ĝuindajn memorojn. Sendu vian eventon al la kunordiganto Jed Meltzer (*paralelauniverso@gmail.com*) aŭ afiŝu ĝin al la Gugla-grupo de *Paralela Universo 2024*: https://groups.google.com/g/paralela-universo-2024

Faru fotojn kaj afiŝu ilin rete, ekzemple sur la PU-paĝo en *Facebook:* https://www.facebook.com/groups/paralelauniverso/

Andy Blair, GEKO, (Usono); tel. +1 902-717-2639

## La facila vento estas nun ĉe ni

https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/pri-la-milito-en-la-orienta-parto-de-kongo-r431/
https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/bela-sperto-en-strasburgo-r432/

## Universitataj diskutoj

En la lunda kunpensigado, mi raportis pri la agado en la univeristato Espoir en Baraka, Kongo DR. Okazis kurso reta pri interlingvistiko gvidata de Ahmad Mamduhi laŭ la lernolibro de Vera Barandovska kun aldona materialo trovebla en https://uea.org/vikio/Materialoj_por_la_studentoj_-_Interlingvistiko

- kurso pri la suahila en Esperanto gvidita de Nino Vessella kaj Joel Muhire, el kiu rezultis nova lernolibro pri la suahila en Esperanto eldonita de ILEI.
- kurso en Esperanto por la nivelo B2 por afrikanoj. Pro teĥnikaj problemoj, la kurso devis forlasi la sistemon *Zoom* kaj transiri al vacapo.
- kursoj en vacapo por komencantoj gvidataj de Françoise Noireau kaj de teameto de afrikaj kuninstruantoj.

Renato Corsetti

## Ekzamenoj en Serbio

En junio Serbia Esperanto-Ligo okazigis kursofinajn ekzamenojn en du grupoj por la kursanoj kiuj finis sesmonatajn retajn kursojn de Esperanto je du niveloj. Sukcese ekzameniĝis ses kandidatoj.

La teamo de instruistoj realigintaj kvin kursojn estas: Aranka LASLO, Nedeljka LOŽAJIĆ, Zlatoje MARTINOV, Živanko NOVAKOV, Radojica PETROVIĆ kaj Jovan

ZARKOVIĆ. Apartan dankon al Nedeljka kaj al la Urba organizo de nevidantoj kaj malfortevidantoj pro la disponigo de la ejo por la ekzameno. La solena disdono de la atestiloj okazos dum la kombinita evento ***Interkulture kaj inkluzive*** en Zemuno, en aŭgusto. Jen la aliĝilo:
https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSey7bqrnKL81bO0DQvZ4AqE2uT_8VxBxqIpi_NusAnaVo_LYg/viewform

## Madagaskaro disradias informojn

Jen la ELSENDO 143 de Aminda Radio Esperanto produktita de esperantistoj el Malagasio. La unua rubriko de nia podkasto proponas al vi kelkajn novaĵojn de la kuranta monato kaj nia amikino Navalona kunprezentas ĝin kun mi. Estas la unua fojo ke ŝi partoprenas en tiu ĉi elsendo. La dua rubriko temas pri la ĉefurba kvartalo Andavamamba, kien turistoj ne kutimas iri. **https://youtu.be/0iD2cUweHTQ**

## Survoje al inda laborplano

Renato Corsetti aperigis en *La Ondo de Esperanto* sian artikolon 'Labor-plano, planoj kaj laboroj', en kiu li prezentas siajn ideojn responde kaj kompletige al la unupaĝa malneto de la laborplano de UEA, verkita de la prezidanto de UEA Duncan Charters. Legu kaj komentu (necesas registriĝi) la artikolon de Corsetti ĉe https://sezonoj.ru/2024/06/corsetti-4/




## Brazila muziko refoje

*Eks-sekreta* video de la kanto *Johano kaj Maria* (originale *João e Maria*), kune verkita kun **Sivuca**, tradukita de **Vitor Mendes** kaj kantita de **Eida Lima**:

## Afrika Retradio

En julio 2023, sub la prizorgado de s-ro Koufionou Koffitché kunlabore inter la Afrika Komisiono de UEA, komencis funkcii la Afrika Retradio, kies sidejo estas en Lomeo, Togolando. Vidu ĉe https://www.esperanto-afriko.org/2024/07/03/afrika-retradio-1-jarigas/

Adjévi Adjé

## Junia ondo - Rusa literaturo tradukita kaj sekurigita

Aperis la junia eldono de la gazeto *La Ondo de Esperanto*. Sur ĝiaj 136 paĝoj (legeblaj laŭ la normoj PDF kaj <ePub> estas pli ol sesdek tekstoj, garnitaj de multaj ilustraĵoj. Verkoj de Ivan Bunin, Aleksandr Kuprin, Maksim Gorkij, Fjodor Sologub, Leonid Andrejev, Ivan Ŝmeljov, Aleksej N. Tolstoj, Vladimir Nabokov kaj Aleksandr Grin jam aperis kadre de la traduka projekto *Rusa novelaro 2* en la ĉiusezona bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2024/06/runo-2/

Konatiĝu kun ĉi tiu ampleksa, bunta kaj riĉe ilustrita eldono (kaj decidu pri abono, se vi ankoraŭ ne abonas ĝin) —https://sezonoj.ru/2024/07/ondo-129/

## La Eo-Tago festata en Afriko

https://esperantoporun.org/eo/esperanto-tago-2024/







Estis aldonitaj du afiŝoj en du afrikaj lingvoj malofte uzataj de esperantistoj, la (ki)konga kaj la lingala.

***SMG:*** Pro Aruŝa, la agado en Afriko ege kreskis!

========= vortoj: 990 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**

**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj**

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.